
# LA PERMANENTA REVOLUCIO

ORGANO DE LA
BOLŜEVISTOJ-
LENINISTOJ.
PROPAGANDAS LA
IV-AN INTERNACION
SOLA TEORIA MARKSISMA
ORGANO EN ESPERANTO.



ANSVARHAVENDE Aage Kjeldsö.Helsingör,Danmark.TRYK Sv.Johannsen,Kbh.
PREZO 0,20 dkr por unu kajero,APERAS monate,ABONO por 1 jaro 2,40 kr.
EDITITA de la Propaganda Komitato de Leviĝu,konsente de I.K.L.
ADRESO Svend Johannsen,Danio,Kopenhago,Australiensvej 24.(Esperanto)

DUA JARO...SESA KAJERO...UNUA EDITO...KOPENHAGO...1936...18 PAĜOJ...

EL LA ENHAVO:

LA KLARA INTERNACIO K LA MILITO.3-a parto(fino),i.a. Sovetio k la milito,la 3-a internacio k la milito,la „revol." pacifismo,la etburĝoj,la defaŭtismo,revol.politiko kontraŭmilita,la 4-a internacio k la milito.

stalinismo: PRI LA 7-A MONDKONGRESO DE KOMINTERNO,de L.T r o c k i j
Centrismo: PROGRAMO DE LA SVEDIA SOCIALISTA PARTIO.
Sennaciismo: ĈU RUGA FAŜISMO EN SOVETIO?I.a.esenco de la faŝ.,ĉu S. estas soc.aŭ ŝtatkapital.ŝtato?...Kial oni ne povas paroli pri r.f.?
plue: RECENZEJO.-„LA GVIDANTO„-SENNACIISTAJ MENSOGOJ.-ktp.

P R E Z A R O :

Prezo por 1 kajero en Dan.,Sved.,Norveg.,0,20 kr.,en Germ.0,15 RM,en Nederl.0,10 fl.,Svisio 0,15 fr.,en Francio 0,70 fr.,en Usono 0,05 doll.,en Ĉekoslov.1 kr. en aliaj landoj 0,25 danaj kronoj.Ni ankaŭ akceptas int. poŝtajn respondkuponojn.Jarabono = prezo por 12 kajeroj.

LA KOMUNISTOJ MALŜATAS KAŜI SIAJN OPINIOJN K INTENCOJN.ILI DEKLARAS MALKAŜE KE ILIAJ CELOJ NUR POVAS ESTI ATINGITAJ PER LA PERFORTA RENVERSO DE ĈIA ĜISNUNA SOCIORDO.TREMU LA REGANTAJ KLASOJ ANTAŬ LA KOMUNISTA REVOLUCIO.LA PROLETOJ HAVAS NENION POR PERDI KROM SIAJ ĈENOJ. ILI HAVAS MONDON POR GAJNI.
P R O L E T O J D E Ĉ I U J L A N D O J , U N U I Ĝ U !



Internationales Esperanto-Museum in Wien
Wien I, Hofburg, Batthyanystiege, 3. Stock

LA KVARA INTERNACIO KAJ LA MILITO. Tria daŭrigo. Sovetio k la imperiis- La tutmonda proletaro eĉ ne rezignos je la defendo de Sovetio tiuka- ze se ĉi tiu estas devigata fari militaliancon kun iu imperiisto kon- traŭ la aliaj; Sed en ĉi tiu kazo ankoraŭ pli ol en ĉiu alia sekurig- os la tutmonda proletaro al si tutecan politikan sendependecon de la sovetdiplomatio k tiel de la kominterna burokrataro.

44. Estante nun kiel antaŭe decida k senkondiĉa defendanto de la labo- rista ŝtato en la batalo kontraŭ la imperiismo, fariĝos la tutmonda proletaro tamen ne alianculo de la imperiismaj alianculoj de Sovetio. La proletaro de la kapitalista ŝtato alianca kun Sovetio rezervas al si sian nepacigeblan kontraŭecon kontraŭ la imperiisma registaro de sia propra lando tutece, Tiusence ne ekzistos diferenco inter ĝia po- litiko k la politiko de la proletaro en la lando batalanta kontraŭ Sovetio. Tamen en la karaktero de la praktikaj agadoj povos rezulti gravaj diferencoj, estigitaj de la konkreta situo. Absurda k krima es- tus ekzemple, se okaze de milito inter Sovetio k Japanio la usona pro- letaro sabotus la forsendon de usonaj armiloj al Sovetio. Kontraŭe estus agoj kiaj strikoj, sabotado ktp nepra devo de la proletaro en la lando militanta kontraŭ Sovetio.

45. La nepaciga proleta opozicio kontraŭ la imperiistaj alianculoj de Sovetio devus disfaldiĝi baze de la interna klasa politiko je la unua flanko, la imperiismaj celoj de la koncerna registaro, la malfidela karaktero de ĝia »alianco«, ĝia spekulado je burĝa revolucio en Sovetio ktp aliflanke. La politiko de la proleta partio en la »alianca« ...n kiel en la kontraŭula imperiisma lando devas sekve esti direktita je la revolucia faligo de la burĝaro k la konkero de la potenco. Nur tiuvoje oni povas estigi veran aliancon kun Sovetio k savi la unuan laboristan ŝtaton je la katastrofo.

46. Interne de Sovetio estigos la milito kontraŭ la imperiista inter- vencio sendube ondon de malfalsa batalemo. Ĉiuj kontradikcioj k antag- onismoj ŝajnos esti forigitaj aŭ minimume malpli gravaj. La junaj generacioj de laboristoj k kamparistoj, elkreskintaj el la revolucio, montros ĉe la fronto potencan dinamikan forton. La centraligita indu- strio montros malgraŭ ĉiuj mankoj k eraroj grandajn avantaĝojn en la militliverado. La registaro de Sovetio sendube havigis grandajn nutr- aĵprovizojn, kiuj sufiĉos por la unua periodo de la milito. La gener- alstaboj de la imperiismaj ŝtatoj sufiĉe bone scias ke la Ruĝa Armeo estas potenca kontraŭulo, k ke la batalo kun ĝi kostas multe da tempo k necesigas terure streĉi siajn fortojn.

47. Sed ĝuste la longa daŭro de la milito neeviteble senmaskigos la kontradikciojn de la transira ekonomio de Sovetio kun ĝia burokrata planado. La novaj grandiozaj entreprenoj montriĝos en multaj kazoj esti morta kapitalo. Sub la influo de la plej necesaj bezonoj de la ŝtato al ĉiuj uzeblaj objektoj plifortiĝos la individualismaj ten- dencoj de la kamparistoj, k la centrifugaj fortoj en la kolĥozoj kre- skos daŭre. La regado de la nekontrolita burokrataro aliiĝos en milit- diktatorecon. La manko de vivanta partio kiel kontrolanto k regul- ganto gvidos al ekstrema akumuligo k pliakrigo de la kontradikcioj. Ible oni eĉ povas atendi kursŝanĝojn al individualisma produktado en la agrarekonomio, metio ktp, altiro de eksterlanda »aliancula« kapitalo, rompo en la eksterlandkomerca monopolo, malplifortigo de la ŝtata kontrolo je la trustoj, pliakrigo de la konkurenco inter la trustoj, bataloj inter trustoj k laboristoj ktp. En la politika direkto povas ĉi tiuj procezoj signifi la perfektiĝon de la bonapartismo, kun la koncernaj ŝanĝoj en la proprajrilatoj. Per aliaj vortoj: kaze de longa milito, ĉe pasiveco de la tutmonda proletaro, fariĝus la internaj soci- alaj kontradikcioj en Sovetio la instigilo al la burĝa-bonapartisma kontraŭrevolucio.

48. La politikaj konkludoj deduktendaj el tio estas evidente:

a. Savi Sovetion kiel laboristan ŝtaton kaze de longa streĉiga milito, nur povas la proleta revolucio en la okcidento.

b. La preparo de la proleta revolucio en la »amikaj«, neŭtralaj k en la kontraŭulaj landoj estas pensebla nur se la avangardo de la tut- monda proletaro estas tute sendependa de la sovetburokrataro.

c. La oferpreta subteno de Sovetio kontraŭ la imperiismaj armeoj dev- as esti samtempa kun revolucia marksista kritiko je la milita k diplomatia politiko de la sovetia registaro, k interne de Sovetio kun la formiĝo de vera revolucia partio de bolŝevistoj-leninistoj.

LA TRIA INTERNACIO KAJ LA MILITO.

49. Ne havante principan linion en la militproblemo, ŝanceliĝas la 3-a

internacio inter defajtismo k socialpatriotismo.En Germanio oni faris el la batalo kontraŭ la faŝismo konkurencon kontraŭ ĝi sur la fundamento de la naciismo.La devizo pri la »nacia liberigo»metita flanken de la devizo pri la »socia liberigo» karikaturas la revolucian perspektivon k ĉiukaze ekskludas la defajtismon.En la problemo de la Saar-distrikto komencis la kom.partio per naŭza humilumado antaŭ la nacisocialismo k nur pro internaj skismoj ĝi ĉesis tion.
Kian devizon propagandos la germania sekcio dum la milito - ĉu»malvenko de Hitler estas la pli malgranda malbono»?Sed se la devizo de la nacia liberigo estis ĝusta sub la »faŝistoj» Müller k Brüning (germ.regnokancelieroj),kiel ĝi do povus nevalidiĝi sub Hitler?Aŭ ĉu la naciismaj devizoj nur taŭgas por pacaj tempoj,sed ne por la milito? Vere,la epigonoj de la leninismo faris ĉ i o n por sin k la laboristojn profunde konfuzigi.

50.La revolucia nepovo de la 3-a internacio estas la rekta sekvo de ĝia idiota politiko.Post la germania katastrofo pruviĝis la politika sensignifo de la t.n.kompartioj en ĉiuj landoj kie ili ekzamenitaj. La francia sekcio,kiu tute ne povis mobiligi kelkajn dekmilojn da laboristoj kontraŭ la kolonirabo en Afriko,sendube montriĝos esti ankoraŭ pli bankrota en la momento de la t.n.»nacia danĝero».

51.La batalo kontraŭ la milito estas nepensebla sen la revolucia mobiligo de la amasoj de la laboristoj en urbo k kamparo k postulas samtempe direktan influon je la armeo k militŝiparo unuflanke,la transporto aliflanke.Sed influo je la soldatoj estas nepensebla sen influo je la laborista k kamparista junularo.La influo je la transporto premisas bonajn poziciojn en la sindikatoj.Sed la 3-a internacio helpe de la Profinterno perdis ĉiujn poziciojn en la sindikatoj. Samtempe ĝi izoligis sin de la laborista junularo.Paroli sub tiaj kondiĉoj pri batalo kontraŭ la milito signifas,semi iluziojn.Por iluzioj ni ne havas lokon,okaze de imperiisma atako je Sovetio montriĝos la Tria internacio esti nenio.

LA "REVOLUCIA" PACIFISMO K LA MILITO.

52.La etburĝa»maldekstra»pacifismo kiel memstara tendenco eliras de tio ke oni per iuj specialaj rimedoj ekstere de la socialista revolucio povus sekurigi la pacon.La pacifistoj en artikoloj k paroladoj predikas »abomenon je la milito»,ili subtenas la individuan militservrifuzon,predikas bojkoton k ĝeneralstrikon(pli ĝuste: la miton de la ĝeneralstriko) kontraŭ la milito.Tre »revoluciaj» pacifistoj eĉ havas nenion kontraŭ tio se oni parolas pri ribelo kontraŭ la milito. Sed ĉiuj,kune k unuope,havas nenian supozeton pri la nedisigebla ligo inter la revolucio,la klasbatalo k la politiko de la revolucia partio. La revolucio estas por ili ne la rezulto de longdaŭra k sistema klopodado,sed literatura minaco al la adreso de la reganta klaso. Utiligante la naturan pacamon de la popolo,sed ne montrante al ĝi la ĝustan elirvojon,fariĝas la pacifistoj senkonscie al sojlo de la imperiismo.En milito staros niaj pacifistaj »alianculoj» plejparte ĉe la fronto de la burĝaro,k uzos la estimon,kiun havigis al ili la reklamo de la 3-a internacio por la patriota desorganizigo de la proleta avangardo.

53.La amsterdama kongreso kontraŭ la milito k la pariza kongreso kontraŭ la faŝismo,organizitaj de la 3-a internacio,estas klasikaj ekzemploj kiel ili interŝanĝas la revolucian klasbatalon kontraŭ etburĝa politiko de demonstracioj,efektplenaj paradoj,potemkinaj vilaĝoj.Je la tago post la bruaj protestoj kontraŭ la abstrakta milito,disiĝis la multekoloraj elementoj,kunigitaj de la kulisreĝisoroj,en ĉiujn direktojn k montriĝis esti nekapablaj,farú ion kontraŭ la vera milito.

54.La anstataŭigo de la proleta unuecfronto,t.e.de batalkontraktoj inter laboristaj organizoj,per bloko de la komunistaj burokratoj kun etburĝaj pacifistoj,kiuj nur je dekono estas honestaj konfuzuloj,dum la plej multaj estas nur karieristoj,gvidas al tuteca eklektikismo en taktikaj problemoj.La stalinistoj montras kiel specialan atingon de la Barbusse-Münzenberg-kongresoj,ke ili kunigis ĉiujn speconjn de la »batalo» kontraŭ la milito,- humanismaj protestoj,individua militservrifuzo,eduko de la »publika opinio»,k eĉ ĝeneralstrikon k ribelon.Metodoj kiuj en la vivo kontraŭdiras unu al la alia,k praktike nur estas aplikeblaj,se oni batalas kontraŭ aliaj,estas nun montrataj kiel elementoj de harmonia tuto.La rusaj »socialrevoluciuloj»,kiuj en la batalo kontraŭ la carismo predikis »sintezan taktikon» - alianco kun la liberaluloj,individua teroro k amasa batalo,estis la modelo

la laboristoj devas bone memori ke la bolŝevismo kreskis en la batalo kontraŭ la populara eklektikismo!

LA ETBURĜOJ K LA MILITO.

55.La batalo kontraŭ la militdanĝero povas plej facile alproksimiĝi la kamparistojn kaj la malsuprajn tavolojn de la urbloĝantaro al la laboristaro,ĉar por ili estas la milito ne malpli ruiniga ol por la proletaro.Ankaŭ nur tiuvoje oni povas,ĝenerale dirite,eviti la militon per ribelo.Sed la kamparisto ankoraŭ pli malfacile ol la laboristo lasas sin [illegible] la revolucian vojon helpe de ŝablonoj,abstraktaĵoj k malplenaj komandoj.La epigonoj de la leninismo,kiuj 1923-24 faris korsŝanĝon sub la devizo „ la vizaĝon al la vilaĝo!„pruvis ke ili tute ne kapablis,konduki la standardon de la komunismo ne nur al la kamparistoj sed ankaŭ al la kamparlaboristoj.La Krestinterno(kamparista internacio) mortis nerimarkite,sen ia ajn mortprediko.La trô fanfarone proklamita „komkero„ de la kamparistaj amasoj montriĝis ĉiam esti akcesoraĵo,se ne nur inventaĵo.Speciale en la regiono de la kamparista politiko ricevis la bankroto de la Tria internacio tre evidentigan karakteron,sed ĝi esence nur estis la neevitebla rezulto de la rompo inter Kominterno k proletaro.

La kamparistaro nur tiukaze iros la vojon de la revolucia batalo kontraŭ la milito se ĝi estas efektive konvinkita de la kapablo de la laboristoj,gvidi ĉi tiun batalon.La ŝlosilo al la venko sekve estas en la fabrikoj k entreprenoj,La revolucia proletaro devas fariĝi efektiva forto antaŭ ol kamparistoj,metiistoj ktp marŝos kun ĝi en unu vico.

56.La etburĝaro en urbo k kamparo ne estas homogena.La proletaro nur trovos alianculojn en ĝia plej malsupra tavolo,la malriĉaj kamparanoj,preskaŭproletoj,stratkomercistoj,subprematoj k disigitaj homgrupoj,kiuj pro siaj vivkondiĉoj ne havas la eblon,evidi memstaran batalon. Ĉi tiun larĝan tavolon de la etburĝoj superas tiuj pintoj kiuj tendencas al la burĝaro k el kiuj specialiĝas la politikaj karieristoj,ĉu de demokrata-pacifista,ĉu de faŝista tipo.Dum ĉi tiuj sinjoroj staras en la opozicio,ili uzas la plej senbridan demagogion,por poste sin vendi des pli multekoste al la grandburĝaro.

La krimo de la Tria internacio estas tio,ke ĝi en la batalo por la revolucia influo je la vera etburĝaro,t.e.je ĝiaj plebejaj amasoj,anstataŭigas per teatraj blokoj kun ĝiaj hipokritaj pacifistaj gvidantoj.Anstataŭ misfamigi la ĉilastajn,ĝi ekvipas ilin per la aŭtoritato de la oktobra revolucio,k lasas la subprematajn malsuprajn tavolojn de la etburĝaro fariĝi politike al la viktimo de iliaj perfidaj provokatantoj.

57.La revolucia vojo al la kamparistaro kondukas tra la laboristaro. Por atingi la konfidon de la vilaĝo,devas la progresintaj laboristoj mem ree atingi konfidon al la standardo de la proleta revolucio.Tion oni nur povas efikigi per ĝusta pilitiko ĝenerale,k ĝusta kontraŭmilita politiko speciale.

LA"DEFAŬTISMO"EN LA IMPERIISTA MILITO.

58.Tiukaze kiam temas pri batalo inter kapitalistaj landoj,rifuzas la proletaro de la militantaj landoj dewide,en la nomo de la milita venko de la burĝaro oferi siajn proprajn interesojn,kiuj ja finfine kongruas kun la interesoj de la nacio k homaro.La formulo de Lenin: „La malvenko estas la pli malgranda malbono„ ne signifas ke la malvenko de la propra lando estas la pli malgranda malbono kompare kun la malvenko de la kontraŭula lando,sed ke la milita malvenko,efikita per la evoluo de la revolucia movado,estas por la proletaro k por la tuta popolo nekompareble pli avantaĝa ol la milita venko,efikita de la „sankta unueco„(interklasa paco).Karl Liebknecht donis la nesuperitan formulon de la proleta politiko en la milito:„La ĉefkontraŭulo de ĉiu popolo staras en ĝia propra lando!„La venkinta proleta revolucio ne nur rebonigos la difektojn,kaŭzitajn de la malvenko,ĝi eĉ estiĝos definitivan sekuron kontraŭ pluraj militoj k malvenkoj.Ĉi tiu dialektika sinteno al la milito estas la plej grava elemento de la revolucia eduko k sekve ankaŭ de la batalo kontraŭ la milito.

59.La aliigo de la imperiisma milito en la civitanan militon estas la ĝenerala strategia tasko al kiu devas esti subordigita la tuta laboro de la proleta partio dum la milito.

La sekvoj de la francia-prusia milito en 1870-71 kiel de la imperiisma milito de 1914-18 (pariza komuno,februara k oktobra revolucioj en Rusio,Revolucioj en Germanio,Aŭstrio-Hungario,ribeloj en aro da militantaj landoj)montras nerefuteble ke la moderna milito inter kapital-

..ŝtaj ŝtatoj sekvigas la klasmiliton interne de ĉiu ŝtato k ke estas la tasko de la revolucia partio prepari la venkon de la proletaro en ĉi tiu milito.

60.La spertoj de la jaroj 1914-18 pruvas plue ke la devizo por la paco tute ne kontraŭas al la strategia formulo de la defajtismo,kontraŭe,ĝi eĉ disfaldigas potencan revolucian forton,speciale,ĉe longa daŭro de la milito.Pacifisman,t.e.trompan,endormigan,paralizan karakteron havas la devizo»por la paco» nur se demokrataj k aliaj politikistoj ĵonglas per ĝi,se la pastraĉoj sendas petpreĝojn ĉielen,por la plej baldaŭa finiĝo de la masakro,se la »homamikoj»,inter ili ankaŭ la socialpatriotoj,plore petegas siajn registarojn,plej rapide fari pacon»sur justa fundamento».Sed la pacdevizo ne havas ion komunan kun la pacifismo,se ĝi venas el la laboristaj kvartaloj k la tranĉeoj,se oni kunigas ĝin kun la devizo pri la interfratiĝo de la soldatoj en la malamikaj armeoj,se ĝi kunigas la subpremaĥojn kontraŭ la subpremantoj.La revolucia batalo je la paco kiu daŭre fariĝas pli grandioza k pli kuraĝa,estas unu el la ĉefaj vojoj al la »aliigo de la imperiista milito en la civitanan militon».

MILITO,FAŜISMO K LA ARMIGO DE LA PROLETARO.

61.Milito postulas »sanktan unuecon».Ĝin povas la burĝaro atingi pro la hodiaŭaj kondiĉoj nur per la faŝismo.Tiel fariĝas la faŝismo al la plej grava politika faktoro de la milito.Batalo kontraŭ milito signifas batalo kontraŭ faŝismo.Ĉiu revolucia programo pri la batalo kontraŭ la milito(»defajtismo»,»Aliigo de la imperiista milito al la civitana milito» ktp)fariĝos malplena vorto se la revolucia avangardo ne povas sukcese kontraŭi al la faŝismo.
Postuli de la burĝaj ŝtato la senarmigon de la faŝistaj bandoj,kiel tion faras la stalinistoj,signifas reprediki la malnovajn frazojn de la germ.socialdem.k de la aŭstromarksismo.Ĝuste Wels k Otto Bauer »postulis» de la ŝtato,ĝi senarmigu la faŝistojn por tiel sekuri la internan pacon.»Demokrata» registaro certe povas - se tio estas por ĝi avantaĝa - senarmigi iujn faŝistajn grupojn,sed nur por kun des pli granda fervoro ankaŭ senarmigi la laboristojn aŭ minimume malebligi ke ili haviĝas al si armilojn.Morgaŭ jam ebliĝos la burĝa ŝtato al la hieraŭ »senarmigitaj» faŝistoj,duoble sin armi k uzi la armilojn kontraŭ la senhelpa proletaro.Turni sin al la ŝtato,t.e. al la kapitalo kun la postulo senarmigi la faŝistojn,signifas semi fiajn demokratajn iluziojn,endormigi la proletaron k senmoraligi ĝin.

62.La ĝusta revolucia politiko konsistas el tio,elirante de la fakto ke la faŝistaj bandoj havas armilojn,cele de la memŝirmo estigi armitajn laboristtaĉmentojn,k ne laciĝante alvoki la laboristojn al memarmado.Ĉi tie estas la fokuso de la tuta politika situo de hodiaŭ.La socialdemokratoj,eĉ la plej maldekstraj,t.e.tiuj kiuj estas pretaj remaĉi la ĝeneralajn frazojn pri diktatoreco de la proletaro k revolucio,aŭ tute ne pritraktas la problemon pri la armado de la laboristoj aŭ rekte deklaras tion kiel »ĥimeran»,»aventuristan»,»romantikan» ktp.Ili proponas anstataŭe(!)propagandon inter soldatoj,kiun ili enve ere nek faras nek povas fari.Tia propono nur servas al la oportunistoj por entombigi la problemon de la laborista armado.

63.La batalo je la armeo estas sendube la plej grava parto de la batalo por la potenco.Nelaciĝanta k memoferema laboro inter la soldatoj estas revolucia devo de ĉiu vere proleta . partio.Tiun laboron oni nur tiukaze povas fari kun sekurigita sukceso premiŝe de ĝusta ĝenerala politiko de la partio,Speciale gravas por la sukceso de la laboro en la armeo en landoj kun granda agrarpopolo la agrarprogramo de la partio,k entute sistemo de transiraj devizoj kiuj tuŝas la fundamentajn interesojn de la etburĝaj amasoj k montras al ili la savontan perspektivon.

64.Sed estus naive kredi,oni povus per nura propagando tiri la tutan armeon al la flanko de la proletaro k tiel nenecesigi la revolucion. La armeo estas heterogena k ĝiaj heterogenaj elementoj estas ligataj per la fera kateno de la disciplino.La propagando povas en la armeo estigi revoluciajn ĉelojn,k varbi la simpation de la plej progresintaj soldatoj.Plion ne povas fari propagando k agitado.Opinii ke la armeo je propra iniciato ŝirmos la laboristajn organizojn antaŭ la faŝismo signifas ŝanĝi la kruĝajn instruojn de la historio kontraŭ dolĉaj iluzioj.La armeo transiros en siaj decidaj partoj dum la revolucia tempo nur tiukaze al la flanko de la proletaro se la proletaro mem pruvas al la armeo ke ĝi estas preta k kapabla por la batalo je la potenco.Tio ree premisas la armadon de la proletaro.

65.Estas tasko de la burĝaro,deteni la proletaron de la konkero de la armeo.Ĉi tiun taskon solvas la faŝismo ne sensukcese,helpe de armitaj ligoj.La plej direkta,plej proksima tasko de la proletaro ne estas la konkero de la potenco sed la defendo de siaj organizoj je la faŝistaj bandoj malantaŭ kiuj staras en certa distanco la burĝa kapitalista ŝtato.Kiu asertas ke la laboristoj ne povas sin armi,tiu per tio nur diras:la laboristoj estas senhelpaj kontraŭe al la faŝismo.Tiam oni ne parolu pri socialismo,proleta revolucio,batalo kontraŭ la milito. Tiam oni disŝiru la komunistan programon k metu la marksismon en la arĥivon.

66.Rifuzi la taskon armi la laboristojn,ne kapablas revoluciulo sed nur impotenta pacifisto;morgaŭ jam kapitulacianto antaŭ faŝismo k milito.La armado estas,kiel pruvas la historio,tre facile organizebla. Se la laboristoj komprenos ke temas pri vivo k morto,ili rapide havigos al si la armilojn.Klarigi al ili la politikan situon,sen voli vualigi aŭ mildigi ion,forigi ĉiujn »konsolajn» mensogojn,tio estas la unua devo de ĉiu revolucia partio.Kiel oni fakte povas defendi in antaŭ sia pleja kontraŭulo,se ne kontraŭante al ĉiu faŝista pondo du ponardojn,al ĉiu revolvero du revolverojn?Se la faŝistoj havigas al si pafilojn,devas la laboristoj havi la samajn armilojn.Alia respondo ne ekzistas,ne povas ekzisti.

67.De kie preni la armilojn?Speciale de la faŝistoj mem.La senarmigo de la faŝistoj estas hontiga devizo se ĝi estas direktita al la burĝa polico.La senarmigo de la faŝistoj estas tre bona devizo se ĝi estas direktita al la revoluciaj laboristoj.Sed la faŝistaj depotoj ne estas la sola fonto.La proletaro havas centojn k milojn da kanaloj por la sinarmado.Oni ne forgesu ke ja estas la laboristoj k nur ili kiuj produktas la per propra mano ĉiujn armilojn.Necesas nur ke la proleta avangardo klare komprenis ke la tasko de la sinarmado estas aktuala.Estas devo de la revolucia partio,preni la iniciaton al la sinarmado de la laboristaj taĉmentoj.Sed por tio oni unue devas esti liberiginta sin de ĉiuj formoj de la skeptikismo,nedecidemo k de la pacifista babilado rilate al la laborista armado.

68.La devizo pri la laborista milico aŭ memŝirmgrupoj havas nur tiel revolucian sencon,se temas pri armita milico,alikaze ĝi nur faras teatraĵojn,paradojn ktp do fariĝas memtrompo.Komprenebl estas la armado en la unua tempo tre primitiva.La unuaj lab.memŝirmgrupoj havos nek haŭbicojn,nek tankojn,nek aviadilojn.Sed je la 6-a de febr.en Parizo,en la centro de forta militistŝtato,preskaŭ ŝturmis bandoj armitaj per revolveroj k bastonoj kun raztranĉiloj la parlamenton k efikigis la faligon de la registaro.Similaj bandoj morgaŭ jam povas detrui la redaktejojn de la proletaj gazetoj aŭ la sindikatajn domojn.La forto de la proletaro estas ĝia multnombreco.En la manoj de la amaso povas la plej primitiva armilo fari miraklojn.Ĉe favoraj cirkonstancoj ĝi povas ebenigi la vojon al pli perfekta armado.

69.La devizo de la unuecfronto fariĝas al centrista frazo se ĝi ĉe la hodiaŭaj cirkonstancoj ne estas perfektigata per la propagando k apliko de certaj metodoj en la batalo kontraŭ la faŝismo.La unuecfronto speciale necesas por estigi lokajn defendkomisionojn.La defendkom. necesas por konstrui k organizi taĉmentojn de la lab.milico.Ĉi tiuj taĉmentoj devas jam ĉe siaj unuaj paŝoj serĉi k trovi armilojn.La memŝirmgrupoj nur estas etapo en la vojo al la ĝenerala armado de la proletaro.Aliajn vojojn tute ne konas la revolucio.

LA REVOLUCIA POLITIKO KONTRAŬ LA MILITO.

70.Unua kondiĉo por la sukceso estas la eduko de la partikadroj en la ĝusta komprenbo por ĉiuj cirkonstancoj de la imperiista milito k ĉiuj ĝin akompanantaj procezoj.Ve al la partio kiu en ĉi tiu aktualega problemo sin limigas al ĝeneralaj frazoj k abstraktaj devizoj!La sangaj okazontaĵoj super ĝia kapo evoluiĝos k ĝin detruos. Necesas estigi specialajn cirklojn por studi la politikajn spertojn de la milito 1914-18(ideologia preparo al la milito de la imperiismo, malĝusta informado de la publika opinio de la staboj per la patriota gazetaro,rolo de la antitezo:defendo k atako,grupiĝoj en la proletaro,izoliĝo de la marksistaj elementoj ktp).

71.Por la revolucia partio estas speciale kriteria la momento de la ekmilito.La burĝa k socialpatriota gazetaro superŝutos kune kun radio k kino la laboristojn per ondoj de ŝovinista veneno.La historio de la bolŝevista partio,kiu estas hodiaŭ tute falsigita,ne servas por realisme prepari la progresintajn laboristojn je la provo,sed endor-

...gi ilin por inventita idealskemo. Ĉe la plej revolucia k plej hardigita partio povas en tiaj momentoj ofte ne tute kontraŭstari. Malgraŭ ke la cara Rusio estis nek demokratio, nek civiliganto, nek la sin defendanta flanko, proklamis la bolŝevista dumafrakcio kune kun menŝevista, je ekmilito, socialpatriotan deklaron kun iom da ruĝeta pacifisma internaciismo. La bolŝevista frakcio prenis baldaŭ revolucian pozicion, sed en la jura proceso kontraŭ la frakcio malaprobis ĉiuj akuzitoj (krom Muranov) kune kun sia teoria gvidanto Kamenev la defajtisman teorion de Lenin. La nelegâ laboro de la partio preskaŭ estis mortinta en la unua tempo. Nur iom post iom aperis revoluciaj alvokoj, kiuj vokis la laboristojn sub la standardon de la internaciismo, sed tute sen iuj defajtismaj devizoj.
La unuaj du jaroj de la milito forigis la patriotismon de la amasoj k ŝovis la partion maldekstren. Sed la februarrevolucio kiu demokratigis Rusion, estigis novan potencan ondon de »revolucia« patriotismo. La majoreco de la pintoj de la bolŝevista partio ankaŭ ĉi tiukaze ne povis kontraŭstari. Ŝtalin k Kamenev donis en marto de 1917 al la Centra Komitato socialpatriotan direkton. Pro tio okazis en la tuta lando alproksimiĝo k en la plej multaj urboj eĉ tuta kunfandiĝo de la bolŝevistaj k menŝevistaj organizoj. Bezoniĝis la protestoj de la plej fermaj revoluciuloj, speciale de la progesintaj distriktoj de Petrograd, bezoniĝis la alveno de Lenin en Rusio, k lia nepacigebla batalo kontraŭ la socialpatriotismo, por ke la partio ree povis ordigi sian internaciisman fronton. Tiel statis la plej bona, plej revolucia, plej hardigita partio.

72. La studado de la historio de la bolŝevismo estas netaksebla grava por la eduko de la progresintaj laboristoj, ĝi montras al ili la premforton de la burĝa publika opinio, kiun ili devas privenki, k ĝi samtempe instruas al ili ne rezigni, ne perdi la kuraĝon malgraŭ tuteca izoliĝo komence de la milito.
Ne malpli zorge estas studenda la batalo de la politikaj grupiĝoj en la aliaj landoj – la militantaj k la neŭtralaj. Speciale signifaj estas la batalspertoj de Rosa Luksemburg k Karl Liebknecht en Germanio, kie la okazintaĵoj prenis alian direkton ol en Rusio, sed gvidis al la sama konsekvenco: oni devas lerni naĝi kontraŭ la fluo.

73. Oni devas zorge observi la hodiaŭ okazantan preparon de la kanonmanĝaĵo por la patriotismo: la diplomatajn ŝajnbatalojn kiuj havas la taskon, ŝovi la respondumon al la kontraŭulo, la perfidaj parolaĵoj de la malkaŝaj k sekretaj socialpatriotoj kiuj konstruas al si ponton de la pacifismo al militarismo, la vantaj devizoj de la »komunistaj« gvidantoj, kiuj jam je la unua tago de la milito ne malpli estos senkapaj kiel la germ. »kom.« »gvidantoj« en la nokto kiam brulis la parlamentejo.

74. Necesas observe kolekti la plej gravajn citaĵojn el la registaraj k opoziciaj artikoloj k paroladoj k mezuri ilin je la spertoj de la antaŭa milito, por tiel antaŭe diveni kian direkton havos la popoltrompo, lasi pruvi tion per la faktoj k instrui al la proleta avangardo memstare orientiĝi en la okazantaĵoj k ne surpriziĝi.

75. La plifortigo de la agitado kontraŭ imperiismo k militarismo ne eliru de abstraktaj formuloj, sed de konkretaj faktoj kiuj tuŝas la amasojn. Necesas ne nur senmaskigi la publikan militbuĝeton sed ankaŭ ĉiujn formojn de la militarismo, kiuj estas maskitaj, neniuj manovroj, militilliveroj, -mendoj ktp restu sen protestoj.
Necesas per bone preparitaj laboristoj ĉiam ree starigi la problemon de la militdanĝero k de la batalo kontraŭ ĝi en senescepte ĉiuj proletaj organizoj k en la laborista gazetaro, postuli de la gvidantoj klarajn k konkretajn respondojn je la demando: kion fari?

76. Por gajni la konfidon de la junularo oni ne nur devas batali kontraŭ la venenigo de iliaj spiritoj per la socialdemokrataro k la stupida burokratismo de la 3-a internacio sed ankaŭ estigi vere internacian organizon kiu fakte apogas sin je la kritika pensado k la memstara revolucia agado de la nova generacio.
Necesas aktivigi la labor. junularon kontraŭ ĉiuj specoj k formoj de ilia militismigo per la burĝa ŝtato. Samtempe oni devas ilin mobiligi k militismigi en la intereso de la revolucio (defendkomitatoj kontraŭ la faŝismo, ruĝaj bataltaĉmentoj, labor. milico, batalo por la armigo de la proletaro).

77. Por ricevi revoluciajn poziciojn en la sindikatoj k aliaj lab. amasorganizoj, oni devas nepacigeble forigi la burokratan ...

taskoj al la ĝeneralaj,de la defendo al la atako,de la patriotaj an…
aûjuĝoj al la faligo de la burĝa ŝtato.
Ĉar la pinto de la sindikata burokrataro en la pleĝ multaj landoj en
la okcidento esence estas neoficiala elemento de la kapitalista poli-
co,devas la revoluciuloj kompreni,nepaciĝeble kontraûbatali ilin,kun-
igi la leĝan agadon kun la neleĝa,batalkuraĝon kun konspiracia singa-
rdemo.
Nur per tiaj kombinitaj metodoj oni povas,komencante ĉe la junularo,
arigi la laboristan klason ĉirkaû la revolucia standardo,ebenigi al
si la vojon en la kapitalistajn kazernojn k veki ĉiujn subprematojn.

78.La kontraûmilita batalo nur tiukaze r icevos vere larĝan,amasan,
popolecan karakteron,se partoprenas je ĝi la laboristino,kamparistino,
la laboranta virino.La burĝa degenero de la socialdemokrataro k la
burokratiĝo de la tria internacio trafas plej forte la plej subprem-
atajn k plej senrajtajn tavolojn de la proletaro,t.e.speciale la lab-
orantaj virinoj.Ilin veki,konkeri ilian konfidon,montri al ili la ĝu-
stan vojon,signifas mobiligi kontraû la militismo la revoluciajn pa-
siojn de la plej multe subpremataj partoj de la homaro.
La kontraûmilita laboro inter la virinaro devas speciale sekuri la
anstataûigon de la viroj mobiligitaj por la armeo per revoluciaj la-
boristinoj al kiuj en milito transiros granda parto de la partia k
sindikata laboro.

79.Se ne sufiĉos la fortoj de la proletaro,eviti la militon helpe de
la revolucio,- tio estas la sola rimedo per kiu oni povas eviti ĝin,-
tiam devas la laboristoj kune kun la tuta popolo partpreni je la mil-
ito.La anarkismaj k individuismaj devizoj,rifuzi partoprenon je la
milito,deserti,ktp esence kontradikcias al la metodoj de la proleta
revolucio.Sed kiel en la fabriko la progresinta laboristo sentas sin
kiel sklavo de la kapitalo,tiel li sentas sin en la kapitalisma ar-
meo kiel sklavo de la imperiismo.Devigita,hodiaû oferi sian forton k
eĉ vivon,li ne lasas forpreni de si sian revolucian konscion.Li rest-
as batalanto,lernas uzi armilojn,klarigas ankaû en la tranĉeoj la
klasan karakteron de la milito,kolektas la nekontentulojn,arigas ilin
al ĉeloj,disvastigas ideojn k devizojn de la partio,atente observas
la ŝanĝojn en la humoro de la amasoj,la foriĝon de la patriota ondo
la kreskon de la ribelo,por en la kriteria momento alvoki la laboris-
soldatojn al subteno de la laboristoj.

LA KVARA INTERNACIO K LA MILITO.
80.Kontraûmilita batalo premisas revolucian batalilon,t.e.partion.
Ĝi ekzistas nun,nek en ŝtata,nek en tutmonda mezuro.Oni devas estigi
la revolucian partion,bazante sin sur la tuta spertaro de la estinto,
inter kiuj ankaû la spertoj de la dua k tria internacioj.Malaprobo de
la direkta k malkaŝa propagando por la 4-a internacio signifas konscia
aû nekonscia subteno al la du ekzistantaj internacioj,,de kiuj la
unua aktive subtenos la militon,dum kontraûe la alia nur povos disigi
k malfortigi la proletan avangardon.(Intertempe montriĝis ke ankaû la
la »komunistoj» estas aktive pretaj subteni militon de Francio kont-
raû Germanio ktp).

81.En la vicoj de la t.n.kompartioj restos certe ne malmultaj honest-
aj revoluciaj laboristoj.La restemo per kiu ili sin-tenas je la Tria
Internacio klariĝas multkaze per revoluciemo kiu ne trovis la ĝustan
vojon.Ilin arigi ĉirkaû la standardon de la nova internacio oni ne po-
vas per kompromisoj,asimiliĝo al iliaj antaûjuĝoj sed kontraûe per
konsekvenca senmaskigo de la ruiniga rolo de la stalinismo(burokrata
centrismo).Speciale akre k nepaciĝeble oni devas ĉe tio hodiaû deman-
di pri ilia sinteno al la militproblemo.

82.Necesas samtempe atente observi la batalon en la reformista fronto
k ŝamtempe la maldekstrajn socialistajn grupojn kiuj evoluiĝas al
revolucio envicigi en la kontraûmilitan batalon.La pleĝ grava kriterio
por esplori la tendencojn en la koncerna organizo estas ĝia aktiva
praktika sinteno al la nacia defendo k al la kolonioj,speciale tiu-
kaze kiam la burĝaro de la koncerna lando regas pri koloniskavoj.
Nur tuta k fakta rompo kun la oficiala publika opinio en la plej grava
problemo de la »patridefendo» estas samsignifa kun la transiro aû min-
imume kun la komenco de la transiro de la burĝa pozicio al la proleta.
La alproksimiĝo de tiaj maldekstraj organizoj devas esti akompanata
de amikeca kritiko de ĉiuj ducnaĵoj en ilia politiko k komuna prilab-
oro de ĉiuj teoriaj k praktikaj problemoj de la milito.

83.Ĉe la fronto de la laborista movado ankaû estas ne malmultaj poli;

...ikistoj,kiuj ja en vortoj rekonas la ruiniĝon de la dua k tria inter...acioj sed samtempe opinias »hodiaŭ ankoraŭ ne estas la tempo»,komen...ci la konstruon de la nova internacio.Tia pozicio ne estas tiu de re...volucia marksisto,sed tiu de seniluziigita reformisto aŭ stupida sta...linisto.La revolucia batalo ne permesas interniton.Eble la cirkonst...ancoj estas hodiaŭ malfavoraj sed revoluciulo kiu ne scias naĝi kon...traŭ la fluo ne estas revoluciulo.Diri ke la konstruo de nova inter...nacio »ne konformas al la tempo» estas la samo kiel diri ke la klas...batalo k speciale la batalo kontraŭ la milito ne konformas al la tem...po.La proleta politiko ne povas eviti en la nuna epoko starigi inter...naciecajn taskojn.La internaciecaj taskoj postulas la kunariĝon de internaciaj kadroj.Ĉi tiun laboron oni ne povas malatentu eĉ nur unu tagon sen kapitulacii je la imperiismo.

84.Kiam eksplodos la milito precize aŭ en kiu stadio ĝi trafos la konstruon de la novaj partioj k de la nova internacio,tion kompreneble neniu profetos:oni devas ĉion fari por ke la preparo de la nova internacio iru pli rapide ol la preparo de la nova milito.Tamen eblas ke la militismo ankaŭ ĉi tiukaze superas la revolucion.Sed ankaŭ tia kazo kiu enkludas grandajn viktimojn k detruojn ne liberigas nin de la devo,tuj komenci la konstruon de la nova internacio.La aliigo de la imperiista milito al la proleta revolucio okazos des pli rapide,ju pli multe estas progresintaj niaj preparlaboroj,ju pli fortaj revoluciaj kadroj ekzistos jam ĉe komenco de la milito,ju pli plane ili laboras en la militantaj landoj,ju pli sekure bazas ilia laboro sur ĝustaj strategiaj,taktikaj k organizaj principoj.

85.La imperiista milito jam ĉe la unua bato detruos la marasman spi...on de la Dua internacio k tendigos ĝiajn naciajn sekciojn.Ĝi decide kontroŝ la vantecon k senpovon de la Tria internacio.Sed ĝi ankaŭ ne ŝparos la centrismajn grupiĝojn kiuj fundamentas je duoneco,evitas la problemon de la internacio,serĉas nur naciajn radikojn,solvas neniujn problemojn tutece,malhavas perspektivon k nutras sin de la konfuziĝo en la laborista klaso.
Eĉ se komence de la milito la veraj revoluciuloj nur estos ree malgranda minoreco,tiam oni tamen ne povas dubi nur minuton ke ĉitiukaze la aliro de la amasoj al la strato de la revolucio okazos multe pli rapide,decide k senrespekte ol dum la unua imperiista milito.La nova revolucia ondo povas k devas fariĝi venka en la tuta kapitalista mondo.
Estas ĉiukaze nekontesteble,ke en nia epoko povas sufiĉe enradikiĝi en la tero de la unuopaj landoj nur tiu organizo kiu bazas sur tutmondaj principoj k estas parto de la proleta mondpartio.
BATALO KONTRAŬ LA MILITO SIGNIFAS HODIAŬ BATALO POR LA 4-A INTERNACIO!
-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-
LEO TROCKIJ:

## P R I L A S E P A M O N D K O N G R E S O D E L A K O M U N I S T A I N T E R N A C I O.

...i petas la legantojn de nia tutmonda gazetaro,pardoni ke mi ĝis nun malgraŭ petoj ankoraŭ ne esprimis min pri la sepa mondkongreso.Mi ne kulpas je la kaŭzoj.La debatoj de la kongreso estis unuflanke tre senformaj,intence neklaraj,aliflanke tute teatraj.Oni decidis la problemojn malantaŭ la kulisoj,ofte per telefono inter la Kremlo k la komisariejo por eksterlandaj aferoj.En la pli malvasta cirklo eble ankaŭ ekzistis io kiel »debatoj».Sed kiam la Politoficejo estis decidinta,tiam oni nomigis la paroladontojn kiuj devis referi pri la decido tiel ke la kominternpinto kiel eble plej malmulte estis kompromitata k ĉiukaze neniu dubu pri la neniam eraranta spirito de la gvidanto.
Oni do devas legi la raportojn pri la diskutoj kiel diplomatiajn dokumentojn,do oni ĉe ĉiu vorto demandu sin:kion la paroladanto envere volas?kion li prisilentas?kaj kial?Dum diplomatiaj dokumentoj estas ĝenerale mallongtekstaj,estas la kongresraportoj kontraŭe nekutime longaj.La laciga amplekso de la raportoj estas helpfaroj de la burokrata memasekuro:oni ja devas fari laŭeble multajn k malĝustajn asertojn sen respekto al ilia sinkontraŭdiro - oni ja ne scias kiuj de decidoj validos estonte.Al tio oni devas kalkuli la sufiĉe malbonajn referaĵojn en la gazetaro.La referaĵo povas esti klara,bona,konvinka nur tie,kie okazas malkaŝa batalo de la ideoj,kiu ja ĉiam helpas al la precizigo de la diritaĵo,sed tie kie la oficisto-paroladanto forviŝas siajn proprajn postsignojn k tiujn de siaj ĉefoj,k kie la ĵurnalisto-oficisto referas la konfuzan paroladon daŭre timante ke li iun ofendas,tie estas la gazetraportoj nur hontiga kunaĵo de senrilataj diraĵoj.Tiaspecaj estas la raportoj en la»Humanité»kun kiuj mi ĝis nun devis kontentiĝi min.Kiam mi ekz.provis,baze de ĉi tiuj

raportoj proksimume prezenti al mi kio estas sub la kondiĉoj de la hodiaŭa krizo la japania laborista movado k kian situon havas en ĝi la japania kompartio,mi eksciis precize nur ke ĉmego je la gvidanto estas japanlingve esprimata per la vorto »bancaj»;sed tion mi jam antaŭe scjis ĉar »bancaj» ankaŭ estas kriata honore al la mikado.Ceter brilis Stalin je la kongreso per silentado,simile kiel la mikado. La t.n. diskutoj» temis pri du problemoj - la »unuecifront»politiko (alia politiko ŝajne hodiaŭ ne plu ekzistas)kontraŭ la faŝismo k la sama politiko kontraŭ la milito.La paroladoj de la referantoj - la vulgara k stupida raporto de Dimitrov k la jezuitaj artifikoj de Ercoli - aldonis nenion novan al la skribaĵoj de la kominternggzetaro, kiuj abundis en la lastaj monatoj,speciale en Francio.La spertoj de la francia kompartio staris en la fokuso de la intereso,k estis rekomendataj kiel utiligindaj.Sed ĝuste la fundamentaj problemoj de la kongreso jam depost longa tempo estas pritraktitaj de la organizoj de la 4-a internacio.Rilate al la moskvaj debatoj ni revoluciaj marksistoj ne bezonas ŝanĝi nur unu linion de tio kion ni ĝis nun diris pri la problemoj de la milito,faŝismo,»unuecfronto» k »popolfronto». Per tio mi tute ne volas diri ke ni lasu la 7-an mondkongreson neatentite.Tute ne!Estas egale ĉu la debatoj estis enhavriĉaj aŭ vanaj - ĉiukaze ili reprezentas etapon en la movado de certa parto de la lab. klaso.Ĝi jam per tio gravas ke ĝi legaligis la oportunisman kursŝanĝon en Francio k ampleksigis ilin tutmonden.La kuriozo de la burokrata pensado montriĝas jene:dum la kongreso unuflanke,minumume sur la papero,donas al ĉiuj sekcioj liberalan aŭtonomion,k eĉ ordonas al ili pensi memstare k asimiligi sin al la naciaj kondiĉoj,ĝi tamen opinias ke por ĉiuj landoj de la mondo,la faŝista Germanio k la »demokrateca» Norvegio,Britio k Hindio,Grekio k Ĉinio,necesas la »popolfronto» k se eble,popolfrontregistaro.La kongreso estas grava pro tio ke ĝi post periodo de la ŝanceliĝado,decide signas la eniron de la Kominterno en la »kvaran periodon»,kies devizo estas:»Daladier al la potenco!»,kies ilago estas la Trikoloro,k kies himno estas la Marseljezo,dum la »Internacio» nur aŭdiĝas de malproksime...
Por povi prijuĝi la profundon de la kursŝanĝo de la Kominterno k ĝian konkretan enhavon rilate al la kondiĉoj en la diversaj landoj,devus ĉiukaze la rezolucioj doni pli ol la debatoj.Sed eĉ ne pri unu sola de la priparolitaj problemoj oni antaŭe publikigis projektojn de rezolucioj.La diskutoj ne temis pri certaj tekstoj,sed disfluis en la nefinon...Nur post kiam ĉiuj paroladintoj estis finintaj sian laŭdkriadon je la gvidanto,k komencis paki siajn valizojn,iris speciala komisiono al la laboro,verki la rezoluciojn.Senekzempla fakto:la oficiala kongreso fermiĝis sen esti akceptinta iun rezolucion!Por tio zorgu la novaj gvidantoj,jam elnomitaj de la kongreso(Dimitrov),laŭeble kun respekto al la deziroj k humoroj de la delegitoj...Tiamaniere malfaciligis la meĥaniko,propra al ĉi tiu kongreso,ĉian ĝusttempan kritikan pritrakton de siaj laboroj en plej alta grado.Sed nun estas publikigitaj la ĉefaj materialoj de la kongreso k tiel nun eblas fari teorian k politikan bilancon.
Estus ĉe nia flanko grava eraro,opinii ke la teorio k praktiko de la »3-a periodo» nun decide k sendolore estas likviditaj per la »memkritiko» de la gvidantoj,k ke la oportunisma k patriota kursŝanĝo havas sennuban estonton.Se ankaŭ la burokrataro tiel facilanime brulis ĉion kion ĝi antaŭe alpreĝis,ĉe la amasoj estas la afero alia.Ili pli sincere k serioze kredas je la malnovaj devizoj.En la konscio de la laboristoj sekvantaj al la Kominterno pluvivas la spirito de la »tria periodo»(1928-34).Ekzemple ĉi tiuspirito ribeligis la franciajn komunistojn de Brest k Toulon(kiujn »komunista» k soc.dem.partio tiel perfide priinsultis en siaj gazetoj.Red.)Provizore sukcesas al la gvidantoj,trankviligi la reziston en la bazo,per mensogaj asertoj,laŭ kiuj Kominterno nunfaras sagacan manovron,trompi la radikalulojn k socialdemokratojn,sed»poste ni montros tion al ili!».Aliflanke havigas la popolfrontisma k patriotisma kursŝanĝo de la Kominterno al ĝi la simpation de novaj tavoloj,kiuj staras malproksime de la laborista klaso,estas patriotoj k nekontentaj kun la franciaj financleĝoj,ili vidas en la kompartio nur la plej energian alon de la popolfronto. Tio signifas,ke en la kompartio k ĉirkaŭ ĝi akumuliĝas kontradikciaj tendencoj,kiuj devas gvidi al unu aŭ pluraj eksplodoj.Por la organizoj de la Kvara internacio sekvas el tio la devo,plej atente observi la internan vivon de la kompartio,subteni la revolucian proletan tendencon kontraŭ la gvidanta socialpatriota,kaj depost nun pli k pli akreniĝas en provoj de kunlaboro inter la klasoj.
Alia dua konsekvenco rilatas al la centrismaj tendencoj k ilia sinteno al la strategia kursŝanĝo de la Kominterno.Neeviteble sentos sin la dekstre centrismaj elementoj altirataj de ĉi tiu kursŝanĝo kiel de magneto.Necesas nur montri al la milittezoj de Otto Bauer,Zyromski k

a rusa menŝevisto Dan, por ke tute klariĝu: ĝuste ĉi tiuj reprezentantoj de la »ora mezo» esprimas multe pli bone ol Dimitrov k Ercoli la veran esencon de la nova kominterpolitiko. Sed ne nur ili. La magnetkampo ampleksas pli maldekstren. La »Neue Front», organo de la Socialista Laborista partio (plej tipa repr. de la maldekstra centrismo, germana partio. Red.) salutas en siaj lastaj du numeroj (17 k 16) kaŝite sub aro da singardemaj rezervoj, la oportunisman kursŝanĝon de la Kominterno, kiel liberiĝon el sektisma ŝoniĝo k transiro al pli »realisma» politiko. Tio sufiĉe bone ilustras ke estas sensencaĵo la paroladado, ke la SAP principe konsentas kun nia politiko, nur malaprobas niajn »metodojn». Envere montras ĉiu granda problemo ha nekongruon de niaj principoj. La proksimiĝanta militdanĝero surprize devigis la SAP-on, proklami la senmoraliĝan devizon pri la »senarmiĝo», kontraŭe al hi. Eĉ Bauer, Zyromski k Dan malaprobas hodiaŭ la senarmigdevizon kiel »nerealan». La sama kontraŭo de la principoj rezultis ankaŭ en la prijuĝo de la evoluo de la Kominterno. Dum la plej granda konjunkturo de »tria periodo» ni tre bone antaŭvidis ke la paroksismo de la ultramaldekstrismo gvidos al nova oportunisma zigzago kiu fariĝos ankoraŭ pli profunda k ruiniga ol ĉiuj antaŭaj. Kiam la Kominterno ankoraŭ brulis en la fajro de la »revolucia defajtismo», ni jam profetiis ke la teorio pri la »socialismo en unu lando» neevitebla havos social-patriotajn konsekvencojn kun ĉiuj siaj perfidaj sekvoj. La sepa kominternkongreso donis surprizigan pravigon de niaj marksistaj prognozoj. K kion nun? La SAP-gvidantoj kiuj ĉion forgesis k nenion lernis salutas la novan, plej kriterian stadion de nesanigebla malsano, en kiu ili vidas simptomojn de »realisma» saniĝo. Ĉu ankoraŭ ne estas klare ke ĉi tie temas pri du nekongrueblaj pozicioj?

De la donita vidpunkto estas tre interese, kiel la maldektre centrismaj partio reagos je la sepa mondkongreso, kiu ĝis nun staris plej proksime al la Kominterno, nome la ILP de Britio. Ĉu ĝi altiriĝos de la malprofunda »realismo» de la sepa kongreso aŭ ĉu ĝi kontraŭe estas forpuŝota de ĝia malfruiĝita k ruiniga oportunismo? De ĉi tiu alternativo dependas la plua sorto de la ILP.

Generale oni povas diri, kiaj ajn estu la unuopaj etapoj k epizodoj, la kursŝanĝo de la Kominterno fiksita de la kongreso plisimpligas la situon en la laborista movado. Ĝi solidigas la socialpatriotan fronton, alproksimigante sendepende de la stato de la »organa unueco», la partiojn de la 2-a k 3-a internacioj. Ĝi plifortigas la centrifugajn fortojn ĉe la centrismaj tendencoj. Des pli grandajn eblojn ĝi donas al la revoluciaj internaciistoj, t.e. al la konstruontoj de la 4-a internacio.

7-9-35 L.Trockij

-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+

TRA LA GAZETARO ESPERANTISTA.

LA LABORISTA ESPERANTISTO raportas ke SATEB nun en aprilo havos jarkonferencon. Salutcn! - INTERNACIA LINGVO, la organo de la poliaj lab. esp. havas ĉefe polllingvan tekston. Ĝojige estas la jeno: (la polia lab. esp. as.) ».kiel klasbatala societo laborista pro principaj konsideroj rifuzas partoprenon en la kongreso (oni opinias la burĝan »universalan» kongreson en Varsovio 1937) opiniante cetere ke en realaj cirkonstancoj de ĉi tiu kongreso la partopreno de laboristaj rondoj estus neebla k sencela.» Ni salutas ĉi tiun decidon. Bedaŭre ne ĉiuj lab. esp. estas tiel klaskonsciaj - la jugoslaviaj ekz. regule partoprenas en burĝaj kongresoj. - LA LABORISTO estas organo de la anarkistaj esperantistoj. Ĝi en marto aperis je la unua fojo presite. Estas interese ke en raporto pri Hispanio ili nenion skribas pri tio ke iliaj hispaniaj kamaradoj rompis la kontraŭparlamentan tradicion k formis la Sindikalistan partion, kiu tre similas k tendencas al niaj organizoj. Simila evoluo okazis kiel konate jam antaŭ pli longa tempo en Nederlando. Nia tiea sindikato (NAS) konsistas plejparte el iamaj sindikalistoj k anarkistoj, nun ĝi staras sur la fundamento de la 4-a internacio. (Kiam Lenin iondis la 3-an internacion okazis simila afero).

BULGARA ESPERANTISTO raportas ke la sofiaj esperantistoj sukcesis kunigi la monon necesan por havigi al si propran hejmon, plue ni legis raportojn pri bulgara esp. kongreso. - En INFORMILO DE LA ESP. AS. DE ESTONIO oni ne malofte legas artikolojn kiuj estas direktataj kontraŭ UEA. Estas ja konate ke granda aro de burĝaj asocioj k gazetoj estas nekontentaj kun la sinteno de la »Universala» (!) Esperantoasoc. - NIA GAZETO enhavis plurfoje stultajn menciojn direktitajn kontraŭ ni resp. niaj kamaradoj, ni ne intencas respondi al tiaj stultaĵoj, cetere ni el la dua lebterkesta mencio direktita al ni, klare nur komprenis (ĉar la resto estas nekomprenebla) ke la red. de »Nia gazeto» ne estas troŝarĝita per inteligento, ĉar ĝi komprenis nur la duonon - k eĉ ĝin malĝuste - de manuskripto kiun k-do S. sendis al ĝi. - VERDA REVUO estas tre amuza gazeto. En unu el la lastaj gazetoj oni ekz. legas pri

„spirita mobilizo kontraŭ militfrenezon„(je la kioma fojo jam?), sed pagojn poste oni legas iomete pri la veraj kaŭzoj de la militoj,la kapitalismo,en la art.„La batalo pri la mondpotenco okeo„.Jes,konsekvence ne estas la plej forta flanko de la burĝoj.

+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+

LA PROGRAMO DE LA SVEDIA SOCIALISTA PARTIO (KILBOM-KOMUNISTOJ).

La svedia socialista partio faras surface tre stabilan k solidan impreson.Ĝi havas naŭ deputitojn en la parlamento,fortan partiorganizon,konsiderindan taggazeton,2 semajngazetojn en la provinco,junulasocion kun 7 000 - 8 000 membroj,kun propra duonmonata gazeto,ĉiuj tre rekomendindaj k alceligindaj aferoj.La problemo estas nur,kun kiu spirito estas ĉi tiuj aferoj plenigitaj,je kiu programo bazas la partio.

Unue iom pri ĝia historio.Ĝi elskismis sin el la komunista partio tuj post la komenco de ties ultramaldekstra periodo(1929),farigis sekcio de la brandlerisma IVKO,do estis dekstra KP-opozicio,tiam ĝi kunfandiĝis kun la maldekstra SP-opozicio(Strŏm),k nun nomis sin „Soc.partio„,tesis la rilatojn al la brandlerista centro k aliĝis al la SAP-internacio,la london-amsterdama oficejo.Ĝia politiko estas tipe centrisma nun.

Ni havas antaŭ ni kelkajn oficialajn dokumentojn,nome 1-e la principdeklaron akceptitan je la unuiĝo de la Kilbompartio kun la Strŏm-grupo meze de apr.de 1934(laŭ Folkets Dagblad 17-4-34),2-e la tiam samé akceptitan agadprogramon(16-4-34,Folkets Dagbl.),3-e la politikan agadprogramon akceptitan je la kunveno de la Centra Komitato paskon de 1935.

La,ne nur laŭ la amplekso,tre malgrasa principdeklaro plenumas eĉ ne la plej malgrandajn dezirojn kiujn oni devas havi pri tia dokumento, speciale se gvidartikolo akompananta la dokumenton,kuraĝas aserti,la unuiĝkonferenco bazis sur la „fundamenta vivanta k forta teorio de la marksismo-leninismo„.Ni unue pritraktu la plej gravan problemon - kiu staras la partio al la problemo de la aliigo de la kapitalista socio, ĉu ĝi estas por la perforta revolucio,la armita ribelo,la proletara diktatoreco,la sovetreĝimo?La „principdeklaro„ne respondas je tio. Certe oni trovas en kelkaj malmultaj frazoj honteman aludon je la oktobra revolucio,:„La rusiaj bolŝevistoj povis venki pro tio,ke ili komprenis gajni la amasojn por sia batalo k ties batalo.Laboristoj, kamparistoj k soldatoj kolektis sin ĉirkaŭ la partio.Tio okazis ĉar la partio pro ĝusta prijuĝo de la situo proklamis la „tagpostulojn„ (!!)kondiĉitajn de ĉi tiu situo.La venko de la rusia revolucio montras la forton de la principo,ke la liberigo de la labor.klaso devas esti ĝia propra verko.

Ĉi tiun vojon kiun iris la laboranta popolo de Rusio en 1917 - tiun vojon ankaŭ devas iri la labo.amasoj de Svedio,se ili volas eliri l krizon.„

Tio estas ĉio kion ili diras pri la instruoj de la rusia revolucio k la problemoj de la okkonkero de la potenco.Oni eĉ ne faras la provon iel konkretigi la instruojn de la rusia revol.,se oni malatentas la filistrecan aludon je la „ĝustaj tagpostuloj„.(Ĉu eble la devizo „La tutan potencon al la sovetoj„ estis nur tagpostulo?ĝe jes,tiukaze unu de tiaj tagoj en kiu „ kiel Marks skribis en letero al Engels - estas enhavataj 20 jaroj.)Ne,se la partiprogramo diras neniun vorton pri la eksterparlamenta batalo,pri la amasstriko,la armado de la laboristoj,la kunligo de leĝaj kun nelegaj metodoj,la signifo de la sovetoj,la neceso detrui la malnovan ŝtataparaton burĝan,la senrekompenca eksproprigo de la eksproprigintoj,tiam perdas la aludo je la oktobra revolucio ĉian enhavon.Jes,ĝi eĉ ricevas trompan karakteron, ĉar en la nomita agadprogramo estas la vojo al la potenco pentrata per la jenaj idilaj koloroj: „Per kunlaboro k iom post iom plifortiĝanta alianco de la laboristoj,malgrandaj k mezaj kamparistoj k la malsupraj tavoloj de la meza klaso ĉirkaŭ la socialista tagpolitiko likvidiĝos la kapitalista anarkio en la politika kiel en la ekonomia kampo.„

Ankaŭ tio estas ĉio kio en la politika agadprogramo estas dirata pri la vojo al la potenco,tiel ke la agadprogramo estas ĉio,nur ne konkretigo de la principdeklaro.Kontraŭe,eĉ la hontema aludo je la neceso de la revolucio estas eliminita k oni malfermas al reformismaj iluzioj ĉiujn pordojn.

Do rezultas ke oni laŭeble vualigas la problemon de la revolucio en la nacia mezuro en la programaj dokumentoj,sed pri iuj internaciaj problemoj,la internacia karaktero de la revolucio k la internacia organiziĝo de la tutmonda proletaro la sveda partio ŝajne havas tute neniam intereson.Certe oni en po unu subfrazo malaprobas la 2-an k trian internaciojn,sed kian internacian programon la sveda partio a

-as,tion oni ne ekscias.La ILP,la hisp.partio de la marksista unu-o,la germ.SAP - ĉiuj grandaj centrismaj organizoj havas pozicion -late al la problemo de la internacio.Certe iliaj pozicioj inter si -iferencas k ili ne estas leninismaj.Kontraŭ la svedia partio eĉ ne -pinias ke estas necese malŝpari nur unu linion de siaj programaj dokumentoj por internaciaj problemoj,kiel ekz.partoprenas la partio je la konferencoj de la london-amsterdama oficejo sen havi ian polit.pozicion.Ĝi tial ankaŭ sentas sin plej multe altirata de la komfortaj »tecrioj«de la SAP,kiu transdonas la solvon de ĉiuj problemoj al la »historia procezo«.Sed eĉ la partopreno je tiaj konferencoj ne trovis ian ekon en la oficialaj programaj dokumentoj.Kompreneble havas la Soc.partio de Svedio la plenan subjektivan liberon sin decidi por aŭ kontraŭ la 4-a internacio,sed ĝi ne havas la rajton rigardi la problemon de la proleta internacio kiel ne ekzistantan.

Kiel neprogresinta la svedia partio estas en tutmondaj problemoj,jam rezultas ankaŭ el tio ke ĝi en sia agadprogramo,akceptita en somero de 1935,kulpigas la komunistojn pro ultramaldekstra k sektisma politiko.Se oni eĉ ne povas postuli ke la svedaj pastigvidantoj komprenas la signifon de la popolfrontpolitiko(kiu jam komencis fine de 1934!!) tiam oni devas minimume postuli ke ili komprenas kion signifas la komuna deklaro de Stalin k Laval de majo de 1935 kiu transdonis la francian proletaron al la francia imperiismo.La dumjara stupida batalo de la brandleristoj kontraŭ la ultramaldekstrismo gvidas ĉi tie al nura domquijotismo,kiu ankoraŭ batalas kontraŭ ultramaldekstra politiko,kiam ĉi tiu jam depost longe fariĝis al ultraoportunismo.

Ankaŭ pri la danĝero de la nova mondmilito k la taskoj de la labor.movado rilate al ĝi ne estas la parolo en la programaj dokumentoj de la sveda partio.Certe aperas en la Principdeklaro la retorika banalaĵo:»Samtempe kreskas la militdanĝero pro la batalo de la kapitalistaj potencgrupoj pro la novpartigo de la mondo«,sed tio estas ĉio kio estas dirata pri la problemo de la milito.Tial ankaŭ la partio ne estis armita okaze de la konflikto itala-abisena.Ĝi (gratulinde) decidis sin kontraŭ la Ligo de Nacioj k ties sankcipolitiko,sed en la partigazetaro oni povis legi artikolojn de iuj kiuj faris la kontraŭon k (erare) postulis liveron de armiloj al abisenio.K post forigo de ĉi tiu eraro komencis la partio kampanjon por la devizoj:»pacon k senarmiĝon«,kun vendo de pacinsignoj ktp,kiuj sufiĉe evidentigis la la etburĝe-pacifisman karakteron de la partio.

Ni nur limigas nin ĉi tie al kritiko de la plej gravaj punktoj de la programaj skribaĵoj de la partio.Per tio ni ne volas impresigi,ke la cetero povas kontraŭstari al marksista kritiko.El la dirito ĉiukaze ~~sufiĉe~~ ~~evidentiĝis~~ ke la ŝajne tiel solida organizo de la svedia soc.partio estas konstruita sur tre nesolida programa fundamento.Pri la plej gravaj problemoj oni aŭ diras tute nenion aŭ superpentras la problemojn per multesignifaj frazoj.La ŝajna stabilo de la partio do nur estas reflekso de la stabilo de la burĝa demokrateco en Svedio kiu siaflanke nur estas reflekso de la svedia ekonomia konjunkturo,kiu bazas sur la tutmonda militpreparo.La problemoj de la klasbatalo ankoraŭ ne montriĝis en sia tuta akreco,tial la social.partio povas malatenti ilin.Kiam Svedio entiriĝos en la krizon,tiam montriĝos la stabileco de la soc.partio k de la burĝa demokrateco en Svedio kiel fantomo.Jam hodiaŭ ekzistas la kontraŭaĵoj en la partio embrie.

Ekz.estas esperige ke la redaktisto de la junula gazeto(Avantgardet) Ole Kellerman,je la 20-a de nov.nomas la plej novajn defendantojn de la »skandinavia demokrateco«,la stalinistajn junul-»gvidantojn«,r e n e g a t o j n k memorigas ilin je la devizo:»la kontraŭulo staras en la propra lando.«Ankaŭ en diversaj artikoloj de la kunredaktisto de »Folkets Dagblad« Nils Flyg,oni trovas kelkfoje malfortajn komencojn de marksista-leninista pozicio.Ju pli frue kunigas sin la evoluigeblaj elementoj de la partio,studas la programajn dokumentojn de la 4-a internacio k sur ĉi tiu bazo gvidas en la partio konsekvencan batalon por siaj opinioj,des pli multe oni povas esperi,ke sukcesos al ili gvidi la ŝipeton de la svedia socialista partio tra la venonta periodo de sufiĉe fortaj ŝturmoj de internaciaj militoj k klasbataloj.

W.H.

LA STALINISTA PERFIDO PRUVITA DE PER LA LERTUNO DE LA »HUMANITE«!

Sekvonte ni donas kelkajn citaĵojn el la centra organo de la francia »komunista« partio,L'HUMANITE.Ni kontraŭas ilin al la sesa el la t.n. 21 kondiĉoj kiuj estas akceptitaj de la dua mondkongreso de la Kominterno,kiu estis tiam ankoraŭ marksista-leninista,en 1920.

Jen ĝia teksto:»Ĉiu partio kiu deziras aparteni al la tria internacio havas la devon,ne nur la malkaŝan socialpatriotismon,sed ankaŭ

la hipokritan socialpacifismon senmaskiĝi,necesas sisteme montri al la laboristoj,ke sen revolucia faligo de la kapitalismo neniu internacia juĝejo,neniu debato pri armlimigoj,neniu demokrateca reorganizo de la Ligo de nacioj povas ŝirmi la homaron je la imperiistaj milit-j."

ĈU EKZISTAS DU DIVERSAJ IMPERIISMOJ?Peri skribis en Humanite la 11-4-35:

Necesas kompreni,ĉu la potencoj kiuj ne havas interreson militi,povas sekurigi la pacon,decidante sin al reciproka helpo,aŭ ĉu ili kapitulacios je la planoj de Adolf Hitler pri novs dispeciĝo de Eŭropo."

LA POLITIKO DE LA KOMINTERNO.De Peri en la »Humanite« de la 16-4-35:

Kiu estas sub ĉi tiuj kondiĉoj en la kadro de la nuna sistemo la sola recepto kiu povas malfaciligi militajn faraĵojn?La plej bona recepto estus certe la ĝenerala senarmigo aŭ limigo de la armado kiun Sovetio proponis k defendis,dum ĉiuj aliaj potencoj batalis kontraŭ tio. Manke de la ĝenerala armadlimigo,je kiu tute ne volas rezigni Sovetio,opinias la registaro de Sovetio k kun ĝi la proletoj en ĉiuj landoj ke la plej bona metodo eviti la militon estas,tiu de la paktoj (!)per kiuj sin devigas la ŝtatoj bojkoti la atakantojn."

LA KOMINTERNO FARAS PROPONOJN AL LA IMPERIISTOJ.Artikolo en la »Humanite« je la 2-4-35.

»Sed kion opinias la registaro de la nacia unuiĝo en Francio pri ĉi tiu opinio de la registaro de la nacia unuiĝo en Britio?Jam ne plu estas sekretaĵo ke Laval iom simpatias kun la proponoj de Hitler. Ĉu li kredas ke interkompreniĝo de la faŝistoj kun la francia imperiismo kontraŭ Sovetio plibonigas la situon de la fr.imperiismo?Ĉu li ke la amasa movado kontraŭ la milito k por la defendo de la burĝesas/sovetoj en Francio havas tute alian forton ol en Britio? Ĉu li jam ne plu memoras pri la proksima estinto kiam la registaro de la francia imp.ne plu povis brili la amasan movado de la laboristoj k soldatoj favore al la diktatoreco de la proletaro,k tial,por povi tion,plej rapide ĉesis la militon kontraŭ Sovetio? Ĉu estas en la nomo de la francia-britia alianco,k s-ro Pierre Laval devis uzi tiajn krimajn senkulpiĝojn,kiujn ni jam tiel ofte senmaskigis...

Ĉic ĉi tio montras ke ankaŭ s-ro Pierre Laval entombigis la orientpakton k la reciprokan helpon.La eksterafera ministro evidente rezignis je la sola formulo de la sekuro(!)kiu povas rezervi la pacon k halti la kreskon de la armado.Lia bedaŭrinda sinteno jam havigis al li la gratulojn de la »Völkischer Beobachter«.Sed ĝi mobiliĝos kontraŭ li la justan koleron de ĉiuj kiuj deziras pacon."

PERI K PERTINAX.Blum diskutas en la Populaire de la 21-4-35 kontraŭ Pertinax de la Echo de Paris,kiun li nomas mallerta amiko de Sovetio,ĉar ĉi tiu kiel realista burĝo vidas la problemon de la alianco kun Sovetio nur sub la vidpunkto de la fortproporcioj.Li nur rigardas la »francajn« interesojn,se li ankaŭ rigardus la »rusajn«,li certe skribus kiel Peri,la vera amiko de Sovetio je la 4-4-35 en la Humanite:

»Aliaj asertas ke s-ro Pierre Laval,same kiel Sir John Simon,simple volis anstataŭigi la orientpakton per aviadilkonvencio,al kiu povos aliĝi la subskribintoj de la Locarnopakto,Sovetio k la etentento.Oni eĉje rakontas esti ricevinta la konsenton de Germanio k Polio por ĉi tiu sistemo.

...,ni ne hezitas skribi,ke ĉi tiu sistemo ne havas ajnan rilaton kun la paco...

La atakanto ne senkuraĝiĝos,se la sola risko kiun li havas,estas tiu ke la aliaj ŝtatoj ne helpas al li aktive.La seninteresa jam estas kuraĝigo por aventuroj.

En la konkreta kazo kiu interesas nin signifas la Laval-a sistemo nur ke Germanio povas realigi siajn planojn en la oriento,ko Francio helpos aktive al ĝi sed ke ĝi ankaŭ ne faros ion kontraŭ tio."

ĈU PERFIDAS SIAN PATRION?Ĉar laŭ Thorez depost Julio de 1934 la komunistoj amas sian patrion,estas tiuj kiuj ne amas sian patrion evidente la burĝoj, tiel skribis Cachin je la 10-4-35:

»Ili senmaskiĝos la ekspluantantojn de la patrio,la abomenindajn kontraŭulojn de la franca popolo,..."

Evidente oni ankoraŭ ne komprenis la veran patrioton Cachin,tial li diskutas kontraŭ la faŝisto Taittinger jene:

»La faŝisto T.rajtas senpune disvastigi militismajn k ofic.diplomatiajn informojn,kiujn li ricevis en la parlamentaj komisionoj.Tiumaniere li povas liveri al Hitler argumentojn por novaj armigoj,...

rioto",kiu tiel perfidas la patrion devas esti subpremata de la ŝtraŭfaŝistoj."

Vaillant-Couturier komencas en la Humanite de la 13-4-35 sanktan militon "Helpu al la franca kulturo! La proletoj reprenu la vorton de Marx:"ni ne havas patrion",sed ili atentu ke ili kiel internaciistoj tamen(?)) havas ion por defendi: nome la kulturan heredaĵon de Francio,la spiritajn riĉaĵojn ..."

KOMINTERNO MALKAŜE ANONCAS SIAN PERFIDON. Tiele oni indikas la taskojn de la proletoj dum milito en la alvoko de la eŭropaj komparticoj de la 18-4.

Ni salutas ĉiujn progresojn kiujn faris la sola patrio de la laboristoj rilate al la militisma kapablo,ĉiujn progresojn kiuj servas al la plifortiĝo de la Ruĝa Armeo,de la laboristoj k kamparistoj ,kiu garantias la pacon,ĉiujn plifortiĝojn de la limoj de la socialista patrio - ni okaze de kontraŭrevolucia milito kontraŭ la socialisma patrio subtenos la Ruĝan armeon de Sovetio per ĉiuj rimedoj k batalos por la malvenko de la germania imperiismo k por la malvenko de ĉiuj potencoj kiuj militas kontraŭ Sovetio..." (Do ne plu estas ĉeftasko por la proletaro,batali por la malvenko de sia PROPRA burĝaro,sed..."por la malvenko de la germ.imperiismo..." Tio signifas paco inter la francia proletaro k burĝaro dum milito - "sanktan union"!)

+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+

JENNACIISMO AŬ MARKSISMO?

ĈU "RUĜA FAŜISMO" EN SOVETIO?

Se homoj kiuj komprenas nenion de politiko sin okupas pri Sovetio, ili kutime venas al la rezulto ke en Sovetio regas "ŝtatkapitalismo", "ruĝa faŝismo","ruĝa imperiismo" a.s.La kaŭzo estas ke ĉi tiuj "teoriuloj" kutime "forgesas",ankaŭ pritrakti la klasan bazon de Sovetio kiuj ja estas la esenca afero.

K-do Lanti.tipa ultramaldekstrulo k idealisto,reprezentas depost la junio de 1935 la "teorion" pri ekzisto de iu "ruĝa faŝismo"en Sovetio.Komprenoble li tute nenion scias pri la esenco de la faŝismo,nek pri la klasa karaktero de Sovetio,sed tio ne malhelpas lin rakonti al la miranta popolo,"ne longe,cerbumante pri tiu akcesora(!) demando" (laŭ Herezulo 5)ke la stalina regsistemo estas speco de faŝismo,"ĉar" la 3 faŝismoj(nigra,ruĝa,bruna)havas la jenajn trajtojn "komune": "unu sola partio kun unu sola estro,absolutisme komandanta,ĉiu parolo k ünvenlibero estas nuliĝita,la gazetaro estas cenzurata,la kontraŭuloj de la sistemo estas malliberigataj aŭ ekzekutataj,la militismo estas senbride,freneze glorata ktp ktp ktp"ĉio tre bone,Lanti forgesis nur unu aferon - nome la klasan karakteron.

Lanti ne klopodis,doni bildon pri la esenco de ĉia faŝismo k pri la esenco de Sovetio - tion ni nun volas fari por li.

KIO ESTAS FAŜISMO?

Rigardante la tipajn formojn de la faŝismo,oni ricevas la jenan rezulton:

a. ombrio de la faŝismo estas regule ekklasigitaj elementoj kun burĝa resp,etburĝa ideologio:iamaj oficiroj(kp.la germanajn "Freikorps") intelektuloj,senlaboraj filoj de etburĝoj(Italio) ,neniam laboristoj.

b. kondiĉoj por la kresko de la faŝismo estas nekapablo de la revolucia partio,ligi la etburĝaron al la proletaro,montrante al la etburĝoj la revolucian elirvojon el la krizo, akra krizo kiu ruinigas la etburĝojn,kiuj pro la malĝusta politiko de la revlpartio ne trovas la vojon al sia natura alianculo,la proletaro.

c. kondiĉoj por la ekkonkero de la potenco flanke de la f.estas: la etburĝaro estas sufiĉe granda parto de la popolo, la revol.partio malgraŭ sia malĝusta politiko estas ĉiutage pli danĝera minaco por la regado de la financkapitalo.

Faŝismo do premisas

kapitalisman sistemon en la formo de la imperiismo(regado.de la financkapitalo),

akran krizon kiu ruinigas la etburĝaron,

sufiĉe granda tavolo de etburĝoj,la etburĝoj estas la amasa bazo de la faŝismo,

la revolucia partio faras malĝustan politikon,tiel ne povas ligi la etburĝojn al la proletaro.

La amasa bazo de la faŝismo do estas la etburĝaro.La etburĝaro povas kiel mortanta klaso(la kapitalismo efikas akumuliĝon k koncentriĝon de la kapitalo)k kiel interklaso inter proletaro k burĝaro(t.s.ke la etburĝoj fariĝas iom post iom aŭ proletoj aŭ kapitalistoj)ne fari memstaran politikon,ĉia politiko estos ĉiam nememstara,la etburĝoj nur politikumas serve al la proletaro - aŭ al la finackapitalo.

La bolŝevistoj en Rusio faris 1917 ĝustan agrarpolitikon.Tial la rusaj kamparistoj aniĝis al la bolŝevismo.Kontraŭe faris la kom.partio de Germanio en la lastaj jaroj malĝustan politikon.Tial aniĝis la germaniaj kamparistoj ne al la kompartio sed al la faŝista Hitler-partio.
La etburĝa karaktero kompreneble ankaŭ montriĝas en ĝia ideologio. Antisemitismo estas ja nur konata ĉe la germ.faŝistoj,sed tio kaŭzas je la speciala situo de la germ.judoj.La „socialismo„de la faŝistoj estas tipa etburĝa „socialismo„,– ili ne intencas nuligi la privatposedon je la produktiloj,ili nur „kontraŭbatalas„ la grandajn trustojn k postulas cetere preferigon de la malgrandaj entreprenoj,ktp.
Se tia „socialismo„ fakte estus realigebla,ĝi estus reakcia k ni devus kontraŭbatali ĝin,ĉar preferigo de la malgrandaj entreprenoj signifas forigo de la grandaj entreprenoj k pro tio malfaciligon de la konstruo de la socialismo,ĉar la socialismo nur estas konstruebla baze de grandega industrio.
Sed la nomitaj postuloj fakte estas tute ne realigeblaj,ĉar ili estas la postuloj de mortanta klaso.La historia evoluo iras la kontraŭan vojon – la leĝoj de la kapitalismo tendencas al forigo de la malgrandaj k fortigo de la grandaj entreprenoj.Ju pli la historio antaŭeniras,des pli kolektiĝas (sub la kapitalismo) riĉo je la unua flanko,malriĉo je la alia flanko de la hodiaŭa socio.Oni ne povas returnigi la historian evolucion.Provas oni tion tamen,fariĝos tia provo nepre reakcia,ĉar oni tiel semas dangerajn iluziojn.
Ankaŭ en aliaj punktoj oni povas montri la etburĝan karakteron de la faŝistaj programoj.Sed tion ni ne povas ĉi tie pro manko de spaco.
LA KLASA KARAKTERO DE SOVETIO.
Por apliki la difinon de la faŝismo al Sovetio,oni antaŭe devas esplori la klasan karakteron de Sovetio.Por tio necesas koni la ekonomian strukturon.
Lenin indikis en 1918 por Sovetio la jenajn 5 ekonomiajn formojn: 1.la patriarĥa kamparista ekonomio(grandparte naturaĵmastrumado),2. la „malgranda varproduktado„,3.privatkapitalismo,4.ŝtatkapitalismo, 5.Socialismo.Ĉi tiuj kvin socioformoj reĝis en la tiama Rusio kune, neniu tutece,kelkaj(1-a,2-a,3-a) estis mortantaj,kelkaj kreskantaj. Tri de ili estas kapitalismaj(2-a,3-a,4-a).(La „malgranda varproduktado„ estis la etburĝa produktadmaniero).La ŝtatkapitalismo k socialismo havas progresivan karakteron,la ŝtato tial subtenis ilin.
La patriarĥa kamparista mastrumado verŝajne nun jam estas tute aŭ esence forigita.Kontraŭe la aliaj kvar ankoraŭ ekzistas,malgraŭ ke la relativa influo de la socialismo ege estas kreskinta.
Ĉar faŝismo nur povas ekestiĝi en kapitalisma sistemo,estas la decida problemo,ĉu Sovetio estas ŝtatkapitalisma,socialisma aŭ ŝtato kun transira ekonomistrukturo.
SOCIALISMO EN SOVETIO?
La socialisma socioordo promisas
1.internacian karakteron de la socialista socio,ĉar la soc.estas pro la tutmonda kunlaboro k laborpartigo,estiĝitaj jam de la kapitalismo,nur konstruebla en tutmonda mezuro.Cetere estas la stalinista teorio pri la eblo,konstrui la socialismon en unu sola izolita lando esence kontraŭrevolucia,ĉar,por konstrui la soc.en iu lando,ekz.Sovetio,oni ja ne plu bezonas la internacian revolucion,kiu laŭ nia opinio estas necesa por la konstruo de la socialismo.(Tio kompreneble ne ekskludas ke oni en iuj izolitaj landoj povas komenci la konstruon de la soc.Sed perfekte estas la soc.nur konstruebla en tutmonda mezuro.)Laŭ la stalinista teorio estas la internacia revolucio ne nur nenecesa,sed eĉ dangera,ĉar per la revolucio oni ja „kolerigas„ la kapitalon k tiel malfaciligas la „socialisman kostruon„ en Sovetio.La sovetia burokrataro,k kun ĝi la burokratoj de la stalinisma Kominterno estas tial kontraŭ la internacia revolucio,k tial tendencas al la likvidigo de la Kominterno.La nova oportunisma politiko de la kominterno nur estas la unua etapo al la likvidigo de la kominterno.La „ruĝaj sindikatoj„ ja jam estas likvidigitaj.
2.Neekziŝtonde burokrataro.Burokrataro estas grupo de homoj kiuj per burokrataj rimedoj haviĝis al si la regadon en iu amasa organizo aŭ en iu ŝtato.Ĉar ĝiaj interesoj kontraŭas al la interesoj de tiuj kiuj enoficiĝis la burokratojn(ekz.estas la sovetia burokrataro kontraŭ,la internacia proletaro por la internacia revolucio)povus la burokrataro ne longe daŭrigi la regadon,se ĝi ne povus sin teni ĉe grupo de privilegiitoj kies interesojn ĝi nun reprezentas.Tiel bazas ekz.la reformista burokrataro sur la „laborista aristokratio„, la burokratoj de la kominterno havas sian bazon en la sovetiaj burokratoj.La sovetia burokrataro siaflanke fundamentas sur la lab.aristokrataro de Sovetio(teĥnikistoj,inĝenieroj,staĥanovlaboristoj)k sur la etburĝaj kamparistoj.La faŝista burokrataro en Germanio,Italio k la „demokrata„ burokrataro de la aliaj imperiistaj landoj baz-

LA PERM.REV.........
ĉi tiuj landoj.
as sur la kapitalista klaso en ĉi tiuj landoj.
Ekzisto de burokrataro do estas pruvo por la ekzisto de privilegiita.
klasoj aŭ tavoloj, ĉar sen ties subtemo la burokrataro baldaŭ estus.
oksoficigata. Aliflanke kondiĉigas la ekzisto de privilegiitaj klasaj
aŭ grupoj la ekziston de burokrataro, ĉar la burokratoj estas agentoj
de la reganta klaso aŭ grupo en la aliaj klasoj resp.grupoj.
Stekmankon de ŝtataparato. Ŝtatoj estas aparatoj por subpremi la lab-
orantajn klasojn. Tion oni povas pruvi analizante la konsiston de ŝta-
to. El kio konsistas ŝtato kutime? El armeo, polico, justico, parlamentoj
burokratoj, ŝtataj entreprenoj, lernejoj, eklezio.
Kiel la historio montras estas la armeo ĉefe uzata okaze de ribeloj
de la lab.klasoj. Eĉ en socialdemokrataj landoj oni uzas la armeon ko
kontraŭ la laboristoj (Germanio-Noske). Cetere nur naivuloj povas kredi
ke ekz.Danio, Norvegio k.a.malgrandaj landoj bezonas sian armeon por
defendi sin en milito. Kontraŭ kiu armeo povus sin ekz.defendi la mal-
granda armeo de Danio? Aŭ en kiu milito fariĝas la malproksima Norve-
gio areno de milito? La armeoj estas do ĉefe uzataj kiel ŝirmo de la
reganta klaso.
Same la polico. Ĉi tiu cetere kune kun la justico devas zorgi por la
konservado de la ekzistantaj propraĵformoj, t.s. por la konservado de
la ekzistantaj rilatoj inter la klasoj.
Kiel armeo k polico servas al la brutala subpremo de la lab.klasoj,
tiel servas lernejo k eklezio al la ideologia subpremo. En la lernejo
oni nur lernas kio utilas al la reganta klaso. Neniu kapitalisma ŝtato
- ankaŭ neniu socialdemokrate regata = ekzemple lasis instrui en siaj
lernejoj la historion laŭ la historia materialismo, malgraŭ ke ankoraŭ
neniu historiisto povis refuti la materialisman historikoncepton k
malgraŭ ke la burĝa historikoncepto havas evidentan kontraŭrevolucin
an karakteron. Plue estas konate ke la „religio estas opio por la po-
polo" (Marks).
En la parlamentoj estas la popolo ne reprezentata sed vendata. Parla-
mentoj estas korupciejoj, partioj kiuj ne volas konfesi tion, nur mon-
tras ke ili jam mem estas korupciitaj.-La kontraŭrevolucian karakter-
on de la burokrataro mi jam montris.
Tiel oni povas pruvi ke neniu ŝtato povas ekzisti en la social.=sen-
klasa socio. Aliflanke devas en klasaj socioj la ŝtatoj ekzisti, kiel
ilo por subpremi la laborantajn klasojn. Ankaŭ laborista ŝtato ne faras
escepton. Laborista ŝtato servas por aubpremi la kapitalistojn. Ĉiu-
kaze ne plu ekzistos en la soc.klasoj, do ankaŭ ne plu povas ekzisti
tiam ŝtatoj. Sekve ne povas ekzisti „socialista ŝtato".
ĈU ŜTATKAPITALISMO EN SOVETIO?
Kiel ŝtatkapitalismon mi difinas: klasan socion en kiu la produktiloj
estas propraĵo de la ŝtato, la ŝtato estas regata de burokrataro, la
burokrataro do estas la nova reganta klaso. (Generale estas la burok.
ne klaso sed parto de alia klaso.)
Klaso estas grupo de homoj kiu estas difinata per speciala formo de
de propraĵformoj. (Bv.atenti ke la koncernaj difinoj en la Plena vort-
aro estas malĝustaj k tipe burĝaj!). Kontraŭe estas „tavolo" nur par-
to de klaso. Ĉi tiuj vortoj havas ĉe la marksistoj precize difinitajn
sencojn, kiu volas ŝanĝi ĉi tiujn kutimajn difinojn devas antaŭe pru-
vi, kial tio necesas. La sennaciistoj apartenas al tiuj, kiuj senkaŭze
prenas aliajn difinojn, ĉe ili ne plu ekzistas diferenco inter klaso
k tavolo. Per tiaj rimedoj oni kompreneble povas „pruvi" ĉion. Tiam oni
ekz.ankaŭ povas pruvi ke Sovetio estas „kapitalista" ŝtato.
Laŭ mia opinio estas la sovetia burokrataro tavolo interne de la
(reganta) laborista klaso. Sovetio do estas lab.ŝtato, la necesa anta-
ŭkondiĉo por la konstruo de la socialismo. La ultramaldekstruloj kon-
traŭe opinias ke S.estas ŝtatkapitalisma ŝtato, ke do unue la burokr-
ataro estas klaso, due ke ĝi estas la reganta klaso.
Kontraŭe oni facile povas montri ke la burokrataro ne estas (kiel
klaso) tute sendependa de la sovetia proletaro, ke ĝi nur estas tavo-
lo interne de la laborista klaso.
Unue ja ankoraŭ ne okazis iu „kontraŭrevolucio" en Sovetio. Regantan
klason oni povas faligi ĉe bone evoluita polic- k militaparato nur
per revolucio. Sed post la oktobra revolucio, kiu nekontesteble iĝis
la laborsistaron al la reganta klaso, ne plu okazis revolucio.
Due estas la fakto ke la sovetia burokr.ne reprezentas la interesojn
de la sovetia proletaro ne pruvo por la aserto, ke la burokr.estas
nova klaso. Ankaŭ en la reformistaj sindikatoj regas la reformistaj
burokratoj kontraŭ la objektivaj interesoj de la laboristoj, tamen
estas la laboristoj nekontesteble tiuj kiuj fakte regas en la refor-
mistaj sindikatoj, ĉar en revolucia situo, kiam la diferenco inter la
interesoj evidentiĝas ankaŭ subjektive por la laboristoj, fariĝas
eĉ la plej reformistaj sindikatoj revoluciaj organizoj, ricevas rev.
estraron ktp. Same okazos en Sovetio ĉe kresko de la revolucia movado
Trie ankoraŭ regas en Sovetio la propraĵrilatoj, kiuj estas estigitaj

de la oktobra revolucio.Dum anbraŭ ekzistas ĉitiuj propraĝrilatoj, oni ne povas diri ke ekzistas nova reganta klaso,la burokrataro. Ĉe plifortiĝo de la tutmonda movado,spec.en la okcidente de Eŭropo, de la prol.revolucio,vidos la laboristoj en Sovetio ke la burokrataro ne reprezentas la interesojn dela laboristoj,sed proprajn,kontrarevoluciajn interesojn,ĉar la ideologio de la burokratoj,la teorio pri la „socialismo en unu lando",estas kontraŭrevolucia teorio.La laboristoj faligos la regadon de la burokratoj - ne per revolucio, ĉar la burokrataro ne estas klaso kiel ekz.la burĝaro - sed per simplaj policakcionoj.Per tio estas montrita ke la sovetia burokr.ne estas klaso sed tavolo interne de la lab.klaso.

Speciala k detala esploro pri la klasaj rilatoj en Sovetio montros ke ĉi tiu perspektivo estas la ĝusta,ke do la burokr.ĝis certa grado estas ankoraŭ kontrolata de la proletaro,ke la kontrolo pligrandiĝos ĉe plifortiĝo de la revolucio en la okcidento,ke do la burokr.ne estas klaso,do tute sendependa tiurilate de la proletaro,sed kontraŭe dependa de ĝi,ke ĝi nur estas parto de la proletaro.

Viaj kontraŭuloj ankoraŭ ne sukcesis doni al ni argumentojn kontraŭ ĉi tiu perspektivo.-Ĉar do la burokr.ne estas speciala klaso,sed nur parto de la reganta proletaro,estas evidente ke la diraĵo pri ŝtatkapitalismo estas sensenca,ĉar ŝtatkapitalismo nur povas ekzisti,se ankaŭ ekzistas klaso,kiu estas la reganta en ŝtatkap.socio.Ni ja ĵus montris ke tia klaso ne ekzistas,ke do Sovetio ankoraŭ estas ŝtato sub proleta diktatoreco.

Se la burokrataro estus klaso,tiam estus Sovetio ŝtatkap.ŝtato.Sed la burokr.nur estas parto de la reganta prol.klaso do ne povas temi pri ŝtatakapitalismo en Sovetio.

ĈU RUĜA FAŜISMO EN SOVETIO?

Sovetio do estas nek nure-socialista,nek nure-ŝtatkapitalisma ŝtato. Ankaŭ la privatkapitalo ne plu havas decidan influon,same ne la etburĝaro.La ekonomia strukturo de Sovetio estas transira.

Supre ni montris ke faŝismo nur ekzistas en kapitalisma socio,kun reganta financkapitalo ktp.En Sovetio ne reĝas iu financkapitalo(se jes,kiu do?),eĉ pri ŝtatkapitalismo,ĉe kiu do la burokrataro estus la nova reganta klaso,oni ne povas paroli.Mankas en Sovetio tute la ĉefaj premisoj por la ekestiĝo de la faŝismo(krom eble la etburĝaro, nome la kamparistoj).

Do la teorio pri la „ruĝa faŝismo" estas tute malĝusta k senbaza.Ĝi ne nur estas malĝusta,ĝi ankaŭ estas danĝera.

Kopenhago,30-4-36 Ĉĉjo.

+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+

„ L A G V I D A N T O . "

La sekvantan citaĵon ni prenis el la ofic.org.de la leningr.distrl sindikata konsilataro,„Ruĝa gazeto",de la 4-2-36.

„Nia tuta amo,konfido,forto,koro,heroismo,vivo...ĉio estas por vi, prenu ĝin,granda STALIN,ĉio estas via,gvidanto de la granda hejmlando.Disponigu pri viaj gefiloj,ili movu sin en la aero,sub la tero, en la akvo k en la stratosfero.La homoj de ĉiuj tempoj k popoloj nomos vian nomon kiel la plej ravigan,fortan,saĝan,belan.Via nomo staras sur ĉiu fabrikejo,ĉiu terpeco,en ĉiu homa koro.Se mia amata edzino naskos al mi infanon,estos la unua vorto kiun mi instruos al ĝi:„S t a l i n „!"

La skribmaŝino rifuzas,skribi pluen.-

+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+

SENNACIISTA MENSOGO.-En n-ro 5-a de Herezulo oni povas legi: „...la historia materialismo eraregas,malatentante la sentojn k ideojn...".Ĉar la senn.ne havas argumentojn,ili devas kontentiĝi per mensogoj.La difino por hist.mat.estas:La ekon.substrukturo(=produktmaniero,produktfortoj,tekniko,klasaj rilatoj ktp) destinas la ideologian superstrukturon(religio,superstiĉo,juro,moralo,scienco,tendenco ktp)kiu reagas sur la ekonomian substrukturon.

Nur sennaciisto povas el tio konkludi ke ni malatentas la „ideojn"...

+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+

REDAKCIAJ KOMUNIKOJ:-La sepa kajero de la „permanenta" enhav.la milittezojn(La 4-a int.k la milito)ankoraŭfoje en formo de broŝuro ĉar ili vekis tiel grandan intereson.Ankaŭ la formo de la daŭriga aperigo estis malbona.Plue diversajn aldonojn,ankoraŭ nepublikigit.

NI NUN ANKAŬ AKCEPTAS ANONCOJN:Prezo por tutpaĝa anonco 5 dkr,por 1 linio 0,25 dkr,por 1 litero 0,05 dkr,minimume 0,30 kronojn por unu anonco = 1 intern.poŝta respondkupono.

NI SERĈAS AGENTOJN EN ĈIUJ LOKOJ K LANDOJ.Kondiĉo:La agentoj devas memesti abonantoj,ili ricevas 20 % por ĉiu anonco,abono ktp haviĝita al ni.Je monopola agentejo ni nur donas 0,10 %.

Admin.

Kopenhago,2-5-36

+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+